Strato en Kyiv ricevos nomon kiel omaĝo al la Ukrainia parlamenta prezidinto Andriy Parubiy, mortigita en Lviv

Iu strato en Kyiv ricevos nomon kiel memorigilo de la Parlamenta eksparolanto Andriy Parubiy, mortigita en Lviv. La instigo por memorigi la elstaran Ukrainian politikiston estis subtenata de 57 procento da partoprenantoj dum publika opinisondo per la apo "Kyiv Digital". Maryna Poroshenko, 1-an de januaro, la estro de la "Eŭropa solidareco", anoncis la nomon de la strato pere de la konsilio de la urbo Kyiv kaj de Facebook.

Lastan decembron, la eksprezidanto de Ukrainio kaj ĉefo de la Eŭropa solidareca partio, Petro Poroshenko, petis de la loĝantoj de Kyiv subtenon por ŝanĝi la nomon de la strato. La strato ne havis nomon je la tempo de la propono.

"Ĉi tiu loko havas egan signifon por nia teamo kaj por Andriy mem - iu signifa parto de lia vojaĝo estas kunligita kun tiu," Poroshenko diris.

Prezidanto Volodymyr Zelenskyy, 1-an de oktobro 2025, subskribis dekreton, kiu donas al Parubiy la titolon de heroo de Ukrainio. Peticio por doni la titolon de heroo de Ukrainio al Parubiy aperis en la prezidanta retejo, 2-an de septembro, kiu gajnis 25,000 subskribojn, kiu estis bezono por la propono estis konsiderita de la prezidanto. Verkhovna Rada, la Ukrainia parlamento, ankaŭ subtenis la peton.

Parubiy estis inter pluraj homoj, kiuj ricevis la titolon de heroo de Ukrainio. Aliaj estis Volodymyr Vakulenko kaj Stepan Chubenko. Poroshenko laŭdis la decidon, rememoriginte, ke "Parubiy dediĉis la tuton de lia vivo al la servo al Ukrainio.

Andriy Parubiy, 54 jara, kiu servis kiel prezidinto de Verkhovna Rada de la 14 de aprilo 2016 ĝis la 29 de aŭgusto 2019, estis pafita kaj mortigita en Lviv, 30-an de aŭgusto 2025.

La pafinto eskapis. Poste, Ukrainiaj aŭtoritatoj detenis iun suspektindulon, kaj citis, ke ekzistas Rusia ligilo kun la mortigoj.

Parubiy estis aktiva partoprenanto de Eŭromajdano. Li ankaŭ servis kiel sekretario de la Nacia sekureco kaj la konsilio de Defendo de Ukrainio de februaro ĝis aŭgusto 2014.

La suspektinda mortiginto de la Ukrainia advokato Andriy Parubiy akceptis sian rolon kiel mortiginto. Li asertis, ke la krimo estis kvazaŭ "venĝo" kontraŭ la landaj aŭtoritatoj. Li neis havi kunlaboron kun specialaj servoj de Rusio.

This article is a translation of “Kyiv street to be named for former Ukrainian parliament chairman Andriy Parubiy, killed in Lviv” by Wikinews contributors, originally published on Wikinews.
Source: https://en.wikinews.org/wiki/Kyiv_street_to_be_named_for_former_Ukrainian_parliament_chairman_Andriy_Parubiy,_killed_in_Lviv

Licensed under Creative Commons Attribution 2.5 (https://creativecommons.org/licenses/by/2.5/)

This translation was made by Eduardus-eo. Any errors in translation are my own.